AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8a jaro JULIO 1953 n-ro 7

A L I Ĝ U k a j Ĉ E E S T U
l a
VIan AŬSTRIAN ESPERANTO-KONGRESON
kaj
INTERNACIAN ESPERANTISTAN RENKONTON
e n
KLAGENFURT - KARINTIO
22an ĝis 24an de julio 1953

Anoncojn TUJ direktu al la Kongresa Komitato:
Klagenfurt, Sternallee 5, Kärnten.

Kongreskotizo S 15.--; familianoj S 10.--

--.--.--.--.--.--

Karaj gesamideanoj !

La afergvidanta vicpresidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, s-ano Cech, havis la okazon ĉeesti la 26an junio kunsidon de la Kongresa Komitato en Klagenfurt. Li detale informis sin pri la progreso de la multaj preparaj laboroj, kiuj promesas interesajn kaj sukcesajn kongresaranĝojn.

Ni refoje alvokas la aŭstrian samideanaron al senprokasta aliĝo al la VI-a Aŭstria Esperanto-Kongreso, al Kiu ĝis nun aliĝis 110 ges-anoj el Aŭstrio kaj gastoj el 10 diversaj landoj, kiuj, traveturiĝante nian Kongresurbon, veturas al la 38a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb.

Speciale ni atentigas la estrarojn de la aŭstriaj Esperanto-societoj (grupoj, kluboj, fakorganizoj) nepre delegi almenaŭ unu samidan(in)on ĉeesti la samtempe (la 24an de julio) okazontan AEF-ĝeneralkunvenon!

La L.K.K.sukcesis interesigi gravajn personojn de la publika vivo al nia Kongreso kaj movado kaj inviti ilin al la "Protektora Komitato": La aŭstria federacia ministro por instruado d-ro K o l b, la episkopo de Gurk-Klagenfurt d-ro K ö s t n e r, la landestro de Karintio W e d e n i g, la landestro kaj urbestro de Vieno J o n a s, la urbestro de Klagenfurt G r a f kaj nia honorprezidanto ĝeneralpoŝtdirektoro d-ro D w o r s c h a k per ilia konsento substrekis ilian intereson kaj ŝaton al nia movado. Plua deko de gravaj personoj kaj meritplenaj samideanoj konsentis eniri la "Honoran Kongresan Komitaton".

Gesamideanoj, legu niajn sciigojn pri la kongreso en la AER-numeroj de la lastaj monatoj, decidu ankoraŭ last-momente p a r t p r e n i nian "VIan" kaj a l i ĝ u !

Eluzu, veturante al la kongreso la favoran 25% rabatan veturprezon je distanco ĝis 250 km, validanta por 6 tagoj; aŭ vojaĝante al la "38a" la rondvojaĝbileton (20% rabato, ekzemple de Wien-Klagenfurt-Villach kaj de Spielfeld-Graz-Wien.

Ĝis revido en Klagenfurt !

La estraro de AEF.

P R O G R A M O

de la

VIa AŬSTRIA ESPERANTO - KONGRESO
Internacia Esperantista Renkonto

Klagenfurt - Karintio

(Kongresa sekretariejo: Sternallee 5)

Merkrede, la 22an de junio 1953:

9'30 Vizito de urbaj vidindaĵoj
12'00 Komuna tagmanĝo
14'30 Rondvojaĝo sur la lago Wörthersee
20'00 Interkona vespero

Ĵaŭde, la 23an de junio:
8'00 Katolika Diservo kun prediko en Esperanto
10'00 SOLENA MALFERMA KONGRES-KUNSIDO
(en la aŭlo de la Dr.Renner-Schule)
Fotografado de la kongrespartoprenantoj
12'00 Komuna tagmanĝo
13'00 Ekskurso al Magdalensberg (elfosaĵoj) kaj al Kastelo Hochosterwitz
20'00 Karintia Folklora Vespero

Vendrede, la 24an de junio: (en la salono de la Kolping-Domo, Adolf Kolpingstraße.)
8'00 Kunsido de la AEF-landestroj
9'00 ĜENERALKUNVENO DE A.E.F.
12'00 Komuna tagmanĝo
13'30 Daŭrigo de la Ĝeneralkunveno de AEF.
20'00 Kongres-fino kaj komuna vespermanĝo
22'20 Forveturo al la "38a" al Zagreb-Jugoslavio.

La Loka Kongres-Komitato:
Prezidanto: Leonhard Schmid, lerneja direktoro e.P.
Vicprezidanto:Franz Watzinger,ĉeflerneja direktoro
Sekretario-kasisto:Karl Dürrschmid,librovendisto
Komitatanoj: Otto Müller, urba oficisto, Alois Ramschak, fervojisto, P.Pius Lenz, O.M.Cap.

DANKESPRIMO. Al s-ano Vokal, estro de la V.E.D., mi kore dankas pro lia kunhelpo okaze de la restado de la Dana Esperantista Karavano en Vieno!Sinner UEA-Del

Informo de la Esperanto-Centro

De la 20a de julio ĝis 17a de aŭgusto la Centro estos fermata.Tamen la grupo "Harmonio"tie daŭrigas siajn kunvenojn ĉiun vendredon je 19'30(Eniro de la korto,Stiege2).

Instruministro Dr.Kolb

estis en monato majo vizitata de s-ano Hofrat Steiner kaj informita pri la aŭstriaj kaj internaciaj Esperanto-aferoj. Intervjuata li diris jenon: " Sur la kampo de la instru-aferoj Aŭstrio jam en 1917 la unuan fojon modele helpis al Esperanto. Esperanto estas allasata en niaj lernejoj kiel nedeviga instrufako, se sufiĉa granda nombro de lernantoj sin anoncas. La Ŝtata Ekzamenkomisiono,

instalita en Aŭstrio por Esperanto, estis modela por vico da landoj.La en Wien instalita "Internacia Esperanto-Muzeo", unika en la mondo, per kontrakto kun nia ministerio por ĉiuj tempoj estas alligita kiel speciala kolekto (Corpus separatum) al Aŭstria Nacia Bibliotheko. La kolektoj estas deponataj en kvin salonoj de Hofburg."

Ĉi-okaze ni danke sciigas, ke s-ro federacia ministro por instruaferoj konsentis eniri la "Protektóran Komitaton" de nia VIa Aŭstria Kongreso kaj asignis al la Kongreso Komitato subvencion de S 1500.--.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: La 5an de julio akceptis la urbestro de Vieno, Franz J o n a s, la partoprenantojn de Dana karavano en la ruĝa salono de la Urbdomo. Vespere okazis en Prater renkonto kun vienaj gesamideanoj.

La 19an de junio vizitis Vienon s-anino Mary Lippert-Browne, iama anino de Danubio, loĝante nun en Londono. En pluraj grupoj ŝi faris paroladojn.

S-ano Josef K r a l, Konkordo, kiu restadis duonan jaron en Chikago, paroladis en la grupoj Konkordo, Danubio kaj Naturamikoj pri siaj interesaj spertoj kaj travivaĵoj.

La 22an de julio alvenos sveda vojaĝsocieto kun 15 esperantistoj al Vieno (17h Westbahnhof). La 23an okazos amika vespero ĉe "Heuriger". Detalajn informojn donas la Verkehrsbüro, Wien I., Friedrichstr. 7. Tel. B 27300.

Vienaj gesamideanoj, atentu !

La 17an de julio aranĝos la Viena Esperantistaro (V.E.D.) en la salono de la Naturamika Centro, Wien XV., Diefenbachgasse 36, je 19a horo salutvesperon okaze de la ĉeestantaj ges-anoj UEA-redaktoro Hans J a k o b kaj s-ino Lorna S a m b l e b e el Melbourne - Australio.

Venu multnombre !

Aliaj vojaĝgrupoj, kiuj vizitos, Vienon:
28a de julio:115 Nederlandanoj (gastigintoj de Vienaj infanoj) inter ili 15 esperantistoj, loĝonte en Gästehaus der Stadt Wien, Wien 18., Geymüllerg. 1, Tel. A 27301.

1-an de augusto: 5 svedaj s-anoj el Karlskoga, hejmen-vojaĝante el Zagreb;
3an de augusto: 2o ges-anoj el Skövde-Svedio, renkonto inter la 19a - 2oa horo en Hotel Matauschek, Wien 14, Breitenseerstr. 14 (Tramo 49).
Ankaŭ estas anoncita esperantista vojaĝgrupo el Sardinio.

STIRIO: La afergvidanto de AEF, s-ano C e c h, vizitis dimanĉe la 21an de junio la s-anojn en Bruck, Leoben kaj Knittelfeld. Li havis okazon interparoli kun la stiria AEF-landestro s-ano Dro Adolf H a l b e d l kaj kun pluraj tieaj ges-anoj. Agrabla ekskurseto finis la viziton ĉe la stiriaj gesamideanoj.

SALZBURG: S-ano C e c h havis la okazon, la 27an de junio ĉeesti amikan kunvenon de Salzburgaj gesamideanoj en la fama bierfarejo kelo de Mülln. Ĉeestis ankaŭ s-ano Schmid, la estro de la e-grupo en Wr.Neustadt.

TIROLO: En Wörgl, la urbo de la unua austria Zamenhof-monumento okazos en la tagoj de 3a ĝis loa de augusto la "IXa Kongreso de la Tutmonda Esperanto Junul - ar - Orgaizo (TEJO) ". Aliĝis jam pli ol 70 ges-anoj el pluraj landoj. Anoncojn de aŭstriaj ges-anoj akceptas la fervora prezidanto de la Kongrespreparkomitato, s-ano Hans S t e i n e r, Wörgl. Augasse 42.

Ĝeneralkunveno de la E-Klubo Innsbruck okazis la 6an de marto en sia sidejo gastejo Otteburg. El la fervora agadraporto de la klubo estu menciataj la aranĝo de 9 estrarkunvenoj, 25 klubkunsidoj, specialaj kunvenoj okaze de vizito de eksterlandaj gesamideanoj kaj de diversaj ekskursoj, unu eĉ al Italio. Speciale menciitaj estis la lektoredagado de s-ano stud.phil. Ölberg ĉe la universitato en Innsbruck, la nelacigable aktivado de s-ano Bauer, la 8ojara Esperanto - nestoro de Innsbruck, kaj la servopreteco de s-ano Stöckl, kiel la fervoraj agadoj de la estro s-ano Richter kaj de la sekretario Mitterberger. La nova klubestraro estas: prezidantoj Martin Stöckl kaj Franz Mitterberger, sekretariinoj Erika Voigt kaj Anni Rainer, kasisto Josef Bauer. AEF dankas al la fervoraj Innsbruckaj ges-anoj kaj deziras pluan prosperadon al la klubo.

K a t o l i k a E s p e r a n t i s t a V i v o

AKLE/Leteradr. W. Mudrak, Wien 3,Beatrixg.19/9/ kunvenas en Wien I., Graben 13/25 (Kreuzbundheim) ankaŭ dum la someraj monatoj regule ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato de la 17a - 20a (ekde 19a horo lingve perfektigo). Jarkunveno de AKLE-Wien okazis 9an de junio sub prezido de p.m. komandoro P. Georg Plank, pastra konsilanto de la katolikaj esperantistoj. Nome de AEF salutis afergv. R. Cech. S-ano Mudrak prezentis detalan raporton pri la agado de la tre vigla grupo. Okazis kurso, kunvenoj, Di-servoj, speciala aranĝo dum Katholikentag. La gezetarservo sukcese aperigis grandan nombron de paresperantaj artikoloj en la katolika gazetaro.
AKLE ankaŭ estonte volas kunlabori en IKUE unuflanke kaj en AEF aliflanke. Oficialaj statutoj estos transdonataj al la kompetentaj aŭtoritatoj kaj prezentataj al aparta fonda kunveno ĝenerala. Ĝis tiam laŭ propono de s-ano L.Huber estis reelektita la ĝisnuna estraro
Kursinfesto okazis la 23an de junio kun prelegoj, deklamoj, kantado kaj sceneto de la 8 gekursanoj, Kara gasto estis s-anino Mary Browne el Londono, kiu antaŭ 20 jaroj kiel Mary Lippert estis AKLE-kursanino.
Kvar kardinaloj en la Honora Komitato de la XXIVa Internacia Kongreso de katolikaj esperantistoj en LOURDES, la 12an - 16an de augusto n. j.
Krom la Viena ĉefepiskopo Kardinalo d-ro Th. Innitzer kiel unua enirinta la H.K. de nomita pilgrim-kongreso nun ankaŭ apartenas al tiu komitato kardinalo Feltin, ĉefepiskopo de Parizo, k-ro Gerlier, Ĉ.ep. de Lyon kaj k-ro Saliége, Ĉ.ep. de Toulouse kaj aliaj eklezíaj kaj laikaj eminentuloj.

FERVOJISTA FERIO-SEMAJNO

La samideanoj de la " Fervojista Esperanto Fakgrupo" sciigas, ke la de ili aranĝata "F.F.-S." de la 7a ĝis 13a de septembro en Bad Ischl promesas bonan sukceson. Aliĝis jam 40 esperantistoj el diversaj landoj.

La bonsukcesan 5an Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Utrecht - Nederlando, ĉeestis deko de austriaj fervojistaj gesamideanoj. Pluraj gazetoj aperigis notojn kaj artikolojn. Detale pro la IFEF-Kongreso raportis la sindikata revuo "Der Eisenbahner".

Viena Pacrondo Esperantista
Korespondadreso: Steffi Krautschneider, Vieno XV,Aegydigasse 12/11;
Kunveno merkrede 22.7. 19'00 en XV. Fünfhausgasse 16: "La Internacia Renkonto de la Esperantistaj pacdefendantoj".
Internacia renkonto de la esperantistaj pacdefendantoj okazos en St.Pölten de la 4a ĝis 6a de septembro.
Korespondadreso:Anton Balague,St.Pölten, Kirchenweg 12 . Aliĝkotizo S 10(4 resp.Kup.) Tranoktejoj por la unuaj 50 anoncantoj senkostaj por pluraj modestpreze.Tagmanĝo S 6 El la programo:Ekspozicio sub la devizo "Paco,Kompreneco, Esperanto".Diskutado:Esperanto la granda ilo por la paco. Interkonvespero,teatraĵo kaj ĥoro en E.,popoldancoj ktp.

Esperanto kaj aŭstria poŝto

La unuan serion de bildkorespondkartoj por eksterlando (afrankvaloro S 1'45), kies bildtekstoj estas ankaŭ en Esperanto,sekvas dua,kun bildoj el Tirolo kaj Supra Austrio,Okaze de la VIa Austria E-Kongreso en Klagenfurt kaj de la IXa Kongreso de la Esperanta Junular-Organzo en Wörgl konsentis la ĝeneralpoŝtdirekcio la uzon de specialaj poŝtŝtampiloj (Sonderpoststempel).

Novaj bildprospektoj kun E-teksto

La landa fremdultrafika oficejo de Klagenfurt (Neuer Markt) kaj la fremdultrafika oficejo de Wörgl eldonis germanlingvajn faldprospektojn, kiuj estas riceveblaj ankaŭ kun Esperantlingvaj tekstfolioj. Mendu la prospektojn kaj menciu, ke vi deziras la E-aldonaĵon.

NEKROLOGOJ

En Solbad Hall mortis fine de majo la edzino de nia ŝatata s-ano oficejkonsilisto K o l l e r. S-anino Adele K o l l e r estis longjara aktiva membro de la E-klubo Solbad Hall.Al nia estimata samideano kaj al lia familio ni esprimas nian sinceran kondolencon.

La gesamideanoj en Wörgl informis nin, ke la 15an de junio tie mortis s-ro urbestro Komerca Konsilanto Martin P i c h l e r, akcelanto de la starigo de la Zamenhof-monumento,kiu antaŭ unu jaro tie estis inaŭgurata. Ni lian memoron ĉiam danke honoros.

Vbb.
(Zl. 3216/47)

"T R A M O N D O" o f e r t a s:

Wörterbuch Deutsch Esperanto	S	20.--
Wörterbuch Esperanto-Deutsch	"	7.--
Für Kursteilnehmer beide zusammen	"	20.--
F i n g r u l i n o	"	8.--
La mondopaco	"	2.--
Tri Majstronoveloj	"	3.--
Senhalte al la celo	"	3.50
Mortado de Nothnagel	"	3.--
Malgranda kor' Jesu	"	1.20
Vienaj legendoj	"	2.50
Kantaro	"	2.--
Junaĝo	"	1.--
La kvar paĝoj	"	1.--
Freude durch Esperanto (Lehrbuch)	"	5.--
Brikisto: Lehrbuch des Esperanto	"	10.--
Leitfaden von Königstedt	"	6.--
Pri la prepozicioj	"	3.--

Einzelstücke - unikaĵoj:

Originala verkaro de Zamenhof	"	90.--
Retoriko de Dro Lapenna	"	40.--
Leteroj de Zamenhof, 2 volumoj po	"	59.--
Leteroj de Lanti	"	34.--
Naciismo de Lanti	"	11.--
Skizo de Filozofio de Ĵil.P.	"	26.--
La dektri mortis	"	30.--
Invito al la ĉielo	"	18.--

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband.
Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck:Offset Vervielfältigung,ADRESSEN-SUPPAN, Wien IV., Brucknerstr. 2, U 41-2-7o